

Venontaj kunsidoj:

- Ma, la 5^{an}
de aprilo
*Paulette-Noëlle
prelegos*
- Ma, la 3^{an}
de majo
*Dialogoj kaj
legadoj*
- Sa, la 18^{an}
de junio
Ekskurso
- Ma, la 6^{an}
de septembro
Decidota

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe: eventaservo.org/o/LES



Marde, la 1^{an} de marto 2022

je la 20^a en *Espace Les Marronniers*
rue des Marronniers 3b, en Vevey

Filmaĵoj projekciadoj

Arkivoj de nia societo

LE MONDE DIPLOMATIQUE
en esperanto. Artikolo de Alain Garrigou

La Panteonon oni eniras, de ĝi oni eliras

La 30^{an} de novembro Joséphine Baker estas enirinta en la parizan Panteonon. Okazanta post serio de omaĝoj, memorfestoj, kaj kelkajn monatojn antaŭ la prezidantelekto, la decido de prezidanto Macron ne estas sen balotaj celoj. Sed fakte : kiel, de pli ol du jarcentoj, oni eniras en Panteonon kaj ... kiel foje okazis, ke iu eliris el ĝi ?

Ĉu la enpanteonigo de Joséphine Baker, post tiu de Simone Veil, povas malkonfirmi la firman prijuĝon de "malsukceso de Panteono" ? Certe la pompo de la gravaj ceremonioj de la Respubliko povas aspekti eksmoda. La cinikuloj aldonas, emfazante politikajn intrigojn per la kutima diraĵo : "Estas reklamo". Dum entombiga ceremonio de Viktoro Hugo en majo 1885, la monarkia verkisto Léon Daudet jam ironiis : "La politika ekspluato de mortintoj estas tradicio de la Respubliko." Ĉu ĝi ne estas tiu de ĉiuj politikaj reĝimoj ? Panteono do plu utilas.

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com ... esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2021-2022

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondoĵoj je la 19^a



jaŭde
la 24^{an} de febr.
ĉe François
Randin
076 411 14 55


Vallombreuse 14, Laŭzano
info@dannir.ch



jaŭde
la 10^{an} de marto
ĉe Charlotte
Blanc Maillard
079 393 32 63

Avenue Nestlé 7, Vevey

Desegnoj de Raymond Burki




Ekspozicio en "Espace Arlaud"
ĝis la 10^a de aprilo 2022



LA FANTOMOJ DE LA LAGO

versio D, parto 1

KRUCVORTENIGMOJ




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Monda, sekulara; 6. Ilo el oro ___ por ĉiu laboro (Zamenhof); 7. Riboj sen ekstremaĵoj; 8. ___ en paco; 9. Ilo el oro taŭgas ___ ĉiu laboro; 11. Unua duono de Ezra; 12. Mallarĝa areo ĉirkaŭ punkto aŭ centro; 14. Preskribo aŭ regulo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Ilo el oro taŭgas por ĉiu ___; 2. Jes ___ ne?; 3. Kaŭzi, fari; 4. Persono el Karelio; 5. Urbo en la itala regiono Umbrio; 6. Modelan, karakterizan; 10. Mallongigo de Reto Ekspresa Regiona de Francilio; 13. Landokodo de Omano.



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. ___ prenas, ___ pagas (Zamenhof); 6. Molekulo havanta nenulan dupoluson; 7. Sufikso esprimanta "membro de grupo"; 8. Malutil', damaĝ'; 9. Turn-bumon de unu flanko de la masto al la alia; 11. La litero N; 12. Angulon malpli grandan ol orto; 14. Havos suficon.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al la baza tono de gamo; 2. Ilo ___ oro taŭgas por ĉiu laboro; 3. Pli-___pli; 4. Tempo ___, tempo pagas; 5. Verdan lokon en la dezerto; 6. Tempo prenas, tempo ___; 10. Kovr' per tero; 13. La litero T.

SOLVOJ

S	O	L	V	S	
N	V	L	U	N	V
O	N	B	I	G	
Z	E	T	N	V	
V	R	V	T	O	d
O	P	N	E	L	

«lam» - tiel komenciĝas tiu terura rakonto. Amiko mia, kiu loĝas en Kanado, decidas ferii en nia regiono kun sia edzino. Li sendas al mi leteron por informi min pri la datoj de sia vojaĝo. Mi do respondas al li, ke mi ĝojas revidi lin kaj lian edzinon. «*Mi iros en la flughavenon por bonvenigi vin.*» Mi notas lian

aventagon kaj horaron en mian agendon: «*Dum miaj libertagoj mi plezure vizitigos vidindaĵojn de nia regiono.*» En la letero li parolas al mi pri restoracio apud la lago sude de mia urbo, kiun li absolute volas koni. Kial "absolute" ... mi ne vere komprenas kial. Ĉu estas specialaĵoj por manĝi tie? Mi decidas atendi renkonti lin kaj esti vidalvide de li por ricevi pli da klarigoj.

Antaŭ kvar jaroj mi amikiĝis kun Francisko, kiam mi iris al Kebekio. Surloke mi aliĝis al fiŝkaptada semajno, al kiu li ankaŭ partoprenis. Mi tuj konstatis, ke lin pasias fiŝkaptado. Li impresis min, ĉar li konas la nomojn de ĉiuj fiŝoj kaj bonege

instruis min pri la danĝeroj de la maroj, la misteroj de la riveroj kaj de la lagoj, pri iliaj flaŭro kaj faŭno. Por mi la fiŝkaptado estas trankvila aktiveco. Sed pere de mia amiko mi ankoraŭ pli perfektigas mian manieron fiŝkapti.

Krom fiŝkaptado li ŝoforis min al multaj vidindaĵoj de lia regiono kaj invitis min en la plej bonaj restoracioj.

Tiutempe, li kaj mi estis fraŭloj. Lastjare li edziĝis. Mi do ne ankoraŭ konas lian edzinon. Li baldaŭ alvenos svislanden por prezenti ŝin al mi.

Je la difinita horo ili surteriĝas Ĝeneven; mi bonvenigas ilin kun granda ĝojo. Ridante, Francisko kaj mi brakumas nin. Poste li prezentas al mi sian edzinon: «*Jen Ĵozefina, mia blondulino, kiel oni diras en Kebekio.*» Juna virino kun longaj nigraj haroj subite kisas min: «*Saluton Marko, mi feliĉas finfine renkonti vin. Nomu min Ĵozi, mi petas.*»


Mi veturigas ilin al mia domo. Mi loĝas en vilaĝo inter urbo kaj montaro. En

mia vilao mi preparis ĉambron por miaj gastoj. Post ilia instalaĵo kaj iomete da ripozo ni kunvenas por manĝi. Por pli bone koni Ĵozin mi demandas al ŝi, ĉu ŝi ankaŭ ŝatas fiŝkapti. Kun mistera rideto ŝi diras: «*Mi preferas naĝi subakve kune kun la fiŝoj kaj malkovri la profundaĵojn.*»

Dum la manĝo ni parolas pri la projekto por la venontaj tagoj. Mi sugestas malkovri lokojn borde de la lago, kie mia amiko kaj mi povos fiŝkapti, dum Ĵozi esploras ruinojn funde de la lago.

Je la morgaŭo, frumatene, ni veturas al mia ŝatata strando. En ĉi tiu loko, dum la tuta tago, mia amiko fiŝkaptas multe da fiŝoj kaj mi male nenium. Kiam Ĵozi desubakve revenas, ŝi tre feliĉas kaj rakontas al ni, ke ŝi malkovris plurajn antikvajn amforojn. Mi tuj diras al ŝi: «*Danĝeras alproksimiĝi de ili.*» Ridante, mi klarigas pri malnovvegaj legendoj, kiuj rakontas, ke fantomoj de la lago loĝas en tiuj ujoj. Tuj ŝi ekridas. Male mia amiko subite silentas kaj paliĝas.

Intervjuo de Toos Godat, fidela membro de LES



(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

Mi somere naskiĝis en Nederlando ĵus antaŭ la dua mondmilito en la fromaĝa urbo *Gouda*. Kiam mi 16jaraĝis, mi metilernis kiel farmacia preparistino. Mi aŭdis pri ebleco trovi en Svislando oficon kaj venis labori en CHUV. Mi renkontis mian svisan edzon sur la skiejoj. Ni gepatras 3 infanojn kun multaj nepoj.

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

Mi volontulis en « *Magasins du Monde* » en Vevey kaj tie mi amikiĝis kun Karlota post sia ĉina vojaĝo kaj tiumomente malkovris esperanton.

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

Tuj Karlota instruis la lingvon al mi dum kelkaj horoj, tamen mi devas konfesi, ke mi ne sufiĉe kaj lerneme studis kaj tre malbone parolas.

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Ili ne vere komprenis mian elekton esti esperantistino.

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Mia patro parolis al mi pri la internacia lingvo, kiam mi junaĝis, dirante, ke ĝi estas la plej bela ideo pri paco sed li mem neniam studis ĝin.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Dank'al Karlota en 2017 mi aliĝis al la belega trajna vojaĝo tra Siberio. Mi ne vere povis paroli, sed iomete komprenis. Poste ni partoprenis la UKon en Seulo. Ega memoraĵo pri Esperantio por mi.